# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 4 N° 5 JUL/AŬG/SEPT 1984

5 bis

## ATENTINDAĴOJ

La nova PRISMA-vortaro Nederlanda-Esperanta-Nederlanda aperos komence de oktobro. La prezo : po BF 295 + BF 25 por la sendokostoj.
Ĝis fine de oktobro, membroj de FEL ne devos pagi tiujn sendokostojn, kaj do tiel ŝparos BF 25.

-----

Venonta estrarkunsido de FEL : Sabaton 6-an de oktobro en Antverpeno.

-----

Ĝenerala Jarkunsido de BEF, sekvota de kunsido de KLUBO 100 :
20 10 1984 en la "Tearoom" de la Centra Stacidomo de Bruselo.

------

19-a Markola Kongreso : 19 - 21 de aprilo 1985 en Brugge (vd meze de la revuo)

------

70-a Universala Kongreso de Esperanto : 03 - 10 de aŭgusto 1985 en Aŭgsburg.
Kotizoj, pagendaj en la konton 000-0163434-86 de Belga Esperanto-Federacio, Montoyerstr. 37 b. 24, 1040 BRUSELO.

| Kongreskotizoj validaj ĝis | 84 12 31 | 85 05 14 |
|---|---|---|
| 1. Ne-individua membro de UEA | 2.845 BF | 3.430 BF |
| 2. Individua membro de UEA | 2.280 | 2.845 |
| 3. Kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro de UEA | 1.725 | 2.280 |
| 4. Kunulo/junulo/handikapulo individua membro de UEA | 1.030 | 1.715 |

------------------------------------------------------------

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00
Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



KLUBO 100 - daŭriga listo de aliĝintoj kaj donacintoj (F. 1000 = membreco)

| | | |
|---|---|---|
| 14 | JACQUES Jean Marie | 1000 |
| 15 | THIBE Jacques | 200 |
| 16 | ESPERANTUJO CHARLEROI | 1000 |
| 17 | GUYOT Mathieu | 1000 |
| 18 | SIMON Ferdinand | 1000 |
| 19 | THOLET Clement | 1000 |
| 20 | ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO | 581 |
| 21 | LECAT R. | 1020 |
| 22 | BRISON Ghislain | 1000 |
| 23 | DEPREZ René | 1000 |
| 24 | BURNAY Robert (laŭ BEF) | 1000 |
| 25 | ORSOLINI Andrée | 1000 |
| 26 | ERNST Elfride | 3000 |
| 27 | A. Lödör | 1000 |
| 28 | W. DE SMET | 1000 |
| 29 | G. LEIBOVITCHE | 1000 |
| 30 | R. GERARD | 1000 |
| 31 | R. de ROOVER | 1000 |
| 32 | L. DE BRUYNE | 1000 |

---------

La 2-a Flandra Kongreso en Aalst

Jen kongreso bonege organizita, glate funkcianta, plene ĝuinda (kaj ĝuata !) Laŭdinda ideo i.a. estis funkciigi la bufedon la tutan daŭron de la kongreso. Tio permesis kiam ajn trovi agrablan ripoz- kaj/aŭ renkontiĝlokon.

Apartajn erojn ni ne volas mencii, ĉar ĉio "glate glitis" aŭ "glite glatis". Ankaŭ la "post-kongreseto", la promenado al Meer Donk kaj posta akcepto ĉe la gepatroj de Hilde bone efikis. Tiamaniere povis esti evitata ke, post la tagmeza manĝo ĉiu sen plie "ĝisus" kaj hejmenirus. Tiel la etoso ne abrupte f_i_niĝis sed plue daŭris dum kelkaj horoj kaj malrapide, amikece forondadis.

Ĉiuj tre ege kontentis.

Gratulojn kaj dankon al la organizintoj .

Protokolo pri la kunsido de FEL - estraro kun grupestroj - de dimanĉo 2-a de septembro en la 2-a Flandra Kongreso en Aalst.

---

Komenco : 9.35 h.

La celo de tiu ĉi kunveno estas ebligi al la grupestroj kaj aliaj aktivuloj esprimi siajn dezirojn, rimarkojn kaj sugestojn.

La prezidanto proponas jenan programon :

1. fari konkretajn proponojn
2. fari ronddemandadon pri eventualaj problemoj pri kiuj FEL-estraro ne konsciiĝas.

1.1. 1984 alportis multe da novaj membroj. 40 % de la nunjara membraro estas novuloj. Tamen, el la membraro de 1982/-83 forfalis 1/3.
Ni enketu pri la kaŭzoj.

1.1.1. pere de formularo sendota.
Tamen, la rezulto estas pridubinda, ĉar tiuj kiuj resendos ĝin, verŝajne faros tion pro ia emocio, kritiko aŭ laŭdo. La aliaj, do, tiuj kiuj perdis la interesiĝon ne plu reagos. Tio do ne donos objektivan rezultaton.
La celo estu : eviti membroperdon kaj rekapti malnovajn membrojn.

1.1.2. pere de buŝa enketo.
Tio ĉi estas realigebla. GCA povas liveri komputilan liston de nerepagintoj kaj sendi tiun al la koncernata grupo cele al rekta kontakto. Tio signifas ke en la grupoj estu trovita(j) persono(j) kiu(j) pretas kaj povas viziti la koncernajn personojn.
El la diskuto kiu sekvas evidentiĝas ke ne multe da ĉeestantantoj entuziasmiĝas pri tiu ideo.
Kvankam la ideo en si mem trovas apogon, la praktiko elmontras nur etan interesiĝon.
-Kalmthout eble povos esti realigata, depende de la realig-eblo de persono kiu jam forlasis la grupon.
- Hasselt : neas
-Mortsel : teorie certe jes, sed tie estas nur unu aktivulo kiu devas fari ĉion.
- Brugge : sendos la rezultaton al FEL.
- Aalst : jam faris kaj havis konsiderindan rezultaton.
- Gent : ne havas problemon, ĉar regajnis siajn membrojn.

J. Verstraeten avertas tamen, ke ne estas facile viziti persone la celatojn, ĉar kiam ili estas hejme ? Kaj se ili estas, ĉu ili pretas akcepti la vizitanton ?



# 19a MARKOLA KONGRESO


# BRUGGE, BELGIO, 19-21 APR. 1985

Kor.adr.: R. Rotsaert, Vissp aanstr. 97, B-8000 Brugge. Tel. 050/330004

# UNUA BULTENO

## La Kongreso

Markola Kongreso estas ĉiujara renkontiĝo de Esperantistoj el la marbordaj regionoj de Belgio, Britio kaj Francio. (Markolo = A: Channel, F: Manche, N: Kanaal.) Ĝi okazas ĉiujare en unu el tiuj regionoj. Al Esperantistoj el najbaraj, sed per ŝtatlimoj dividitaj regionoj, ĝi donas eblecon interkonatiĝi.




## La Urbo

Brugge (E: Bruĝo) jam estis menciita en la 7a jarcento. Ekde la 10a jarcento ĝi havis foiron. En la postaj jarcentoj ĝi kreskis kaj iĝis unu el la plej gravaj havenoj de norda Eŭropo. Pro diversaj kialoj, la riĉeco perdiĝis kaj restis la mezepoka etoso. Pro tiu etoso, ĉiujare venas amasoj da vizitantoj el la tuta mondo.

## La Kongresejo

Hotel St. Christophe (Nieuwe Gentweg 76, B-8000 Brugge, tel. 050 33.11.76) estas familia hotelo kun loĝebleco por proksimume 40 personoj. Ĝi havas salonon je dispono de la kongresanoj kun pli ol 100 sidlokoj.

La hotelo troviĝas en kvieta urbokvartalo, je kelkminuta distanco de la Beginejo kaj la plej gravaj muzeoj.

## Kotizo

| valuto | ĝis 1984.08.31 | ĝis 1985.01.15 | - poste |
|---|---|---|---|
| BF | 800 | 1.000 | 1.250 |
| FF | 120 | 150 | 180 |
| GBP | 10 | 12.50 | 15 |

La kotizo eble ŝajnas iom alta, sed la LKK intencas havigi al la partoprenantoj liberan eniron en ĉiuj gravaj muzeoj kaj senpagan aŭtobusveturadon trihoran en kaj ĉirkaŭ la urbo.

Tamen, se vi nun jam scias ke vi ne vizitos muzeojn aŭ ne partoprenos al aŭtobusa vizito, vi rajtas subtrahi 150 BF (aŭtobuso) kaj/aŭ 200 BF (muzeoj) de via kotizo.

## Pago

Belgio kaj aliaj landoj:

Belga poŝtĝirkonto n-ro 000-1410956-04 de Roland Rotsaert, VissPaanstraat 97, B-8000 Brugge.

Peranto por Britio:

Peranto por Francio:

## Restado

La ĉi-jaraj prezoj de St. Christophe estas jenaj:

| | |
|---|---|
| dupersona ĉambro kun duŝo kaj necesejo | 1.710 BF |
| unupersona ĉambro kun duŝo kaj necesejo | 1.010 BF |
| dupersona ĉambro sen duŝo/necesejo | 1.132 BF |

Ankaŭ estas kelkaj tripersonaj ĉambroj. La prezoj inkluzivas matenmanĝon. Ili estos adaptataj venontjare laŭ inflacio.

Eblas mendi hotelĉambron per la apuda aliĝilo.

## Kial veni ?

Pro la Markola Kongreso, komprenenble. Tamen estas pluraj kialoj por longigi vian restadon en Belgio:

- En la regiono estas multaj lokoj malpli konataj ol Bruĝo, sed same vizitindaj.
- En Gent okazos de la 20a ĝis la 28a de aprilo mondfama ekspozicio de floroj: "Floraliën".
- En Bruselo okazos aro da ekspozicioj pri Hispanio (Europalia).



19a Markola Kongreso - Brugge, Belgio, 19-21 apr. 1985

## Aliĝilo

(Bv. sendi al persono al kiu vi sendis pagon)

| Por administrado |
|---|
| Pago |
| 1 |
| 2 |
| Rimarkoj |

Unua aliĝanto

Nomo: ..............................

Adreso: ..............................

..............................

Dua aliĝanto

Nomo: ..............................

Adreso: ..............................

(nur se malsamas) ..............................

Substreku la literon kiu validas por alfabeta ordigo de la nomo.

Mi pagis kotizo(j)n de .... x ........... = ....... je ..........

## Loĝado

☐ mi (ankoraŭ) ne mendas loĝadon

☐ bonvolu rezervi ĉambron (laŭ eblecoj):

☐ unupersonan ☐ kun duŝo/necesejo ☐ en kongresejo

☐ dupersonan ☐ sen ☐ ..................

☐ ..................

ekde .................. vespere ĝis .................. matene

Se vi havas rimarkojn aŭ specialajn dezirojn, vi notu ilin sur la dorsflanko de la aliĝilo kaj metu krucon. ☐

## Enketo

Ekzistas videobendo (20-minuta) pri Bruĝo. Se estas sufiĉe da kandidatoj, eblas fari E-version. Prezo: proks. 4.000 BF.

☐ tio ne interesas min

☐ mi eble aĉetos

☐ mi certe aĉetos

# ESPERANTO PANORAMA



## ESPERANTOWOORDENBOEK VAN MIDDELKOOP WEER OP DE MARKT

Het Esperantowoordenboek van Drs. A.J.M. Middelkoop, uitgegeven bij Uitgeverij Het Spectrum, zal begin oktober weer op de markt komen. Het is een lijvig werk geworden van meer dan 500 bladzijden waarin zowel een woordenboek Esperanto-Nederlands als Nederlands-Esperanto is opgenomen. Ten opzichte van de eerste uitgave van 1971 werden verbeteringen en talrijke nieuwe termen ingevoerd.

De eerste uitgave van Middelkoops woordenboek is jarenlang een begrip geweest onder de Nederlandstalige esperantisten. Toen de uitgeverij meedeelde dat het voorlopig uitverkocht was, begon de jacht tot in de kleinste boekenwinkeltjes toe om toch nog een exemplaar op de kop te kunnen tikken.
De nieuwe uitgebreide versie kunnen we beslist aan iedereen aanbevelen, zowel aan de nieuwe Esperantosprekenden als aan hen die nog in het bezit zijn van "een oude Middelkoop".

De prijs van het woordenboek werd vastgesteld op 295 fr. U kan het bestellen door overschrijving van 295 fr. plus 25 fr. port op rekening nr. 402-5510531-55 van de Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Als u de 25 fr. verzendingskosten wilt sparen, kan u het boek natuurlijk ook komen afhalen op het genoemde adres, en dat vanaf midden oktober.



Plia propono estas testi inter kelkaj personoj.
Kelkaj opinias ke ni ne estu tro optimisma pro membroperdo. Tio ja estas la ĝenerala fenomeno ankaŭ en aliaj organizoj.
Tamen, atentigas iu, la Esperantomovado ne estas nepre komparebla kun aliaj organizoj. Al Esperanto aldoniĝas la lingvo. Tio implicas bezononde kontinueco, bezonon esti en la movado.

1.1.3. fari enketon inter lernantoj.
M. Van den Bempt, kiu jam faris enketojn, disponigos al la diversaj grupoj kaj kursgvidantoj sian demandaron.

P. Peeraerts redaktos formularon uzotan por la enketo inter eksmembroj

2. Ronddemandado.

2.1. TD okupiĝos pri kontaktoj inter la grupoj kaj la FEL-estraro.
Tamen, pro la grandaj distancoj, rektaj kontaktoj ne ĉiam eblas.
Tial ŝi ne konas ĉiujn problemojn.

2.1.1. WDS aludas al vizitoj de eksterlandanoj kiuj pretas prelegi en diversaj kluboj. Problemo estas ke la programoj estas de antaŭe fiksitaj. Ili jes estas ŝanĝeblaj, sed ne sen problemoj.
Ĉu ne pli bonus grupigi tiajn programojn ?
TD proponas ke oni avertu ŝin en tiaj kazoj por ke ŝi povu kontakti diversajn grupojn.

Fino de la kunsido : 10.30 h.

protokolis : JB

---

P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 8-a de septembro en Antverpeno en la hejmo de Paul kaj Trees Peeraerts - Dooms.

---

Ĉeestas : Trees Dooms (TD), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Hilde Vaningelgem (HVI), Jules Verstraeten (JV) kaj Jan Bovendeerd (JB)

Petis senkulpigon : Edward Symoens kaj Erik D'Hont, samkiel Kristin Tytgat.

Prezidas : ID
Protokolas : JB

Komenco : 14.00 h.

1. Interna agado.

1.1. La enketoj pri kiuj temas en la antaŭa protokolo.
TD opinias ke estus bone fari la enketon okaze de vizito al la grupoj kaj proponas ke ni alvoku la grupestrojn inviti nin.
Ŝi telefonos al la grupoj por ekspliki la aferon kaj por peti kunlaboron.
ID faros same inter la kursgvidantoj.

1.2. Enketo inter ekskursanoj.
PP okupiĝas pri la preparo de la necesaj formularoj.
La enketo eble fariĝu malgrandskale, komence ĉe konatoj.

1.3. JB proponas kiel unuan paŝon organizi studotagon, iu "cerbum-pristurmo" (brainstorming).
La ceteraj tamen opinias ke la enketo kaj la cerbumtago estas sendependaj unu de la alia.
ID proponas ĝin okazigi (la studtagon, do) post nia oktobra estrarkunsido, do, je sabato 6-a de oktobro ekde la 14-a horo en la Esperantodomo en Antverpeno kun jena programo :
- kion faru la kursgvidantoj por ke la kursanoj ne tuj post la lernado forlasu la rondon
- kion faru la grupgvidantoj por akcepti la novulojn.
JB avertos kaj invitos la interesitojn al tiu studotago.

2. Kotizoj.
Ĉu la kotizoj estu altigitaj ?
Laŭ PP tio ne nepre necesas.
Proponiĝas altigi la abonprezon de ESPERANTO PANORAMA progresive, por ke post kelkaj jaroj la abonprezo kaj la kotizo estu egalaj.
PP proponas fiksi la abonprezon por 1985 je BF 120.
Jena propona akceptiĝas sub rezervo de konsento de la kasisto, kiu ne ĉeestas.

3. Prisma vortaro.
La nova vortaro NL-E°-NL aperos en oktobro.
Kondiĉe ke FEL aĉetu minimume 2000 ekzemplerojn ĝi akiros la solvendrajton por la Esperantomovado en Belgio.
Ni povos uzi parton de la deponitaĵoj en la Verda Konto, el kiu certa parto cetere estas speciale deponita kun tia celo.
PP kontaktiĝos kun la eldonisto "Het Spectrum" por la fina aranĝo.
Planita rabato por antaŭmendo ne estas akceptata de "Het Spectrum".
La prezo estu senŝanĝe : BF 295,-



4. Leterpapero.
La proponita projekto ne estas unuanime akceptita.
PP faros novan projekton kaj prezentos ĝin kiel eble plej baldaŭ.

5. Eldonoj.
Niaj propraj eldonaĵoj kaj specife "JAĤTO VETURAS FOR ..." de Deck Dorval ne ankoraŭ eniris la grandan publikon. Kiel diskonigi ilin ?
Recenzoj ĝenerale tro longe lasas sin atendi.
ID proponas diskonigi ilin en formo de donacoj al gravaj personoj okaze de internaciaj renkontiĝoj, kun la peto rapide publikigi recenzon kaj reklami ĝin.
Konsentite.

6. Financoj
6.1. FEL-rentumo.
En la VERDA KONTO la rentumo sumiĝas je 6 %. Tamen normale ni devas subtrahi 25 % de la rentumo kaj pagi ĝin al la Ŝtato. Tiamaniere la rentumo estas nur 4,5 %. Ĝis nun ni ankoraŭ ne faris tion, ĉar fakte temis nur pri malgrandaj sumoj. La ŝtato nun tamen postulas la bilancon de la konto kaj do eltrovos la situacion.
Je informpeto ĉe la impostoficisto, li akceptis ke ni komencu per la procedo ekde 1985.
Ĉu por kompensi la diferencon, FEL devus altigi la rentumon ĝis 8 % ?
Tiu procedo kostus al ni ± 20.000 BF. Alie ni riskas forfuĝon de kapitalo.
Decidiĝas altigi la rentumon ĝis 8 %, sub rezervo tamen ke la kasisto konsentu post ide-sondado de du personoj el la financa sektoro.

6.2. Kongresoj.
Jam estas sciate ke la kongreso de Aalst estas gajnodona.
La rezultato de la kongreso en Leuven ankoraŭ ne estas konata.
TD kaj ID opinias ke bone estus povi disponi pri estrarano pri kongresoj kiel ekzistas en UEA (KKS) por kontroli kaj konsili.
TD informiĝos pri preta persono.

6.3. Beneluksa kongreso.
Surtabliĝas dezirindeco de Beneluksa kongreso. Laŭ ID nacia kongreso tro facile invitas al krokodilado.
PP favoras la ideon, sed kun indiko "organizita de FEL".
ID sondos la eblecojn inter Nederlandanoj, Valonoj kaj Luksemburganoj.

7. Diversaĵoj.

7.1. Paco kaj Justeco.

En la protokolo de la antaŭa estrarkunsido troviĝas informo laŭ kiu la edzinoj de la membroj de tiu grupo ne plu volas esti membrinoj de FEL.

Tio ĉi estas erara indiko !

Intertempo la afero jam reguliĝis.

7.2. Libro-servo.

Dum la kongreso en Aalst evidentiĝis ke la kondiĉoj (precipe la prez-politiko) nepre bezonas re-ekzamenadon.

Ni atendas inviton de FLEJA por rediskuti la aferon.

Fino de la kunsido : 18.00 h.

JB.

---